# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-09 n-ro 411

## Ligna filtro igas salakvon trinkebla



Pli ol dekmilo da familioj en orienta Afganio translokiĝis pro malkvieteco

Rusujo minacis sin retiri el MOK meze de disputo pri porkaĵa komerco

La Kruela Postlasaĵo de Kristoforo Kolombo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Pli ol dekmilo da familioj en orienta Afganio translokiĝis pro malkvieteco
*Pli ol 100 000 homoj fariĝis senhejmaj p. 03*

Rusujo minacis sin retiri el MOK meze de disputo pri porkaĵa komerco
*Disputo pri porkaĵa komerco inter Rusujo kaj la Eŭropa Unio p. 03*

Francujo: miloj da kurdoj postulas justecon por la tri aktivulinoj murditaj en Parizo en 2013
*La manifestaciantoj kondamnis la silenton kaj la inertecon de Parizo p. 04*

La nova ondo en Silicia Valo – vendado de nefiltrita akvo
*Akvo sen modifo, sen filtrado, sen ĥemiaĵo kiel fluoro p. 05*

Ekos en Ameriko la PEN-kampanjo por Nobel-premio
*Disvastigi la esperantan literaturon p. 05*

Ligna filtro igas salakvon trinkebla
*Favorkosta procedo por la sensaligo de marakvo p. 06*

La Kruela Postlasaĵo de Kristoforo Kolombo
*Ĉu Pravigi la Konkeron aŭ Defendi la Indianojn? p. 07*

## Pli ol dekmilo da familioj en orienta Afganio translokiĝis pro malkvieteco

Loka novaĵ-agentejo raportis dimanĉe, ke pli ol 15 000 familioj en la afgana orienta provinco *Nangarhar* translokiĝis al aliaj regionoj pro la malkvieta situacio en la lasta jaro.



Proksimume 60% de tiuj familioj venis el la regiono *Khogyani* de la provinco. Pli ol 100 000 homoj fariĝis senhejmaj pro la kontinua malkvieteco en *Nangarhar*. Laŭ donitaĵoj de la Internacia Organizo pri Elmigrado, estas proksimume 50 000 senhejmuloj en la regiono *Khogyani*.

Kun la alveno de malvarma vintro, tiuj delokitaj familioj kaj senhejmuloj urĝe bezonas helpmaterialojn. Ili esperas, ke la afgana registaro plibonigos la sekurecan situacion en *Nangarhar* kiel eble plej baldaŭ por ke ili povu reveni al siaj hejmlokoj en frua dato.

La raporto diris, ke la ĉefa kaŭzo de la translokiĝo kuŝas en tio, ke okazis kontinua armita konflikto inter la ekstremisma grupo Islama Ŝtato kaj Talibano en la pasinta jaro. La plejparto de la regiono *Khogyani* estas sub la regado de la Islama Ŝtato, kaj pluraj aliaj regionoj de la provinco *Nangarhar* estis infiltritaj de la Islama Ŝtato en malsamaj gradoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

## Rusujo minacis sin retiri el MOK meze de disputo pri porkaĵa komerco

Sergej Kalaŝnikov, la unua vicprezidanto de la Ekonomia Komitato de la Federacia Konsilio de Rusujo, diris dimanĉe [07 jan 2018], ke Rusujo eble sin retiros el la Monda Organizo pri Komerco, se la organizo faros decidon nefavoran al Rusio rilate al la disputo pri porkaĵa komerco inter Rusujo kaj la Eŭropa Unio.




Kalaŝnikov diris, ke la EU efektivigas serion da sankcioj kontraŭ Rusujo, kio malobservas regulojn de la Monda Organizo pri Komerco; se la organizo kontentigos rilatajn petojn de la EU, Rusujo devos redukti sian partoprenon en la organizo kaj eĉ sin retiros el la organizo.

Post la eksplodo de la ukrainia krizo, la EU enkondukis serion da sankcioj kontraŭ Rusujo, kaj la lasta prenis kontraŭrimedojn, inkluzive de malpermeso de porkaĵa importado el membroj de la EU. Antaŭ nelonge la EU diris, ke ĝi petos Rusujon ĉiujare kompensi 1 390 milionojn da eŭroj pro tio, ke Rusujo malpermesas porkaĵan importadon el membroj de la EU. La EU jam prezentis siajn petojn al la organizo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Francujo: miloj da kurdoj postulas justecon por la tri aktivulinoj murditaj en Parizo en 2013

Kolektiĝo de Kurdoj okazis pasintan sabaton [06 jan 2018] por postuli justecon, post la murdo de tri kurdaj aktivulinoj en 2013 en la franca ĉefurbo. La manifestaciantoj kondamnis la silenton kaj la inertecon de Parizo.



Dum la nokto de la 9-a ĝis la 10-a de januaro 2013, la tri kurdaj aktivulinoj Sakine CANSIZ, Fidan DOGAN kaj Leyla SAYLEMEZ estis pafmortigitaj en la 10-a arondismento [distrikto] de Parizo. Kvin jarojn poste, miloj da kurdoj manifestaciis sabaton la 6-an de januaro en Parizo por postuli «veron» kaj «justecon» pri tiu triobla murdo.

La manifestaciantoj kondamnis la «silenton» de la francaj aŭtoritatoj pri tiu afero. La homamaso plurfoje skandis «ERDOĞAN murdisto!», tagon post la renkontiĝo en Parizo inter Turka Prezidento Recep Tayyip ERDOĞAN kaj Emmanuel MACRON.

**«Ŝajnas, ke oni kaŝas de ni aĵojn»**

«Kvin jarojn de silento, kvin jarojn de justica rifuzo, kvin jarojn de nepuniteco», proklamis flagrubando, montrante la ridetantajn portretojn de la tri aktivulinoj ĉekape de la defilado. Ĉeestis manifestaciantoj venintaj de pluraj landoj, interalie Germanujo.

Ali DOGAN, frato de Fidan DOGAN, defiladis en la homamaso. Li konfidis, ke «li ne plu havas esperon» pri Francujo pri tiu afero. «Hieraŭ, mi spektis la gazetkonferencon inter ERDOĞAN kaj MACRON. Estas malĝoje, ke la prezidento ne elvokis la murdon de mia fratino [...] ŝajnas, ke oni kaŝas de ni aĵojn, kaj ke Francujo ne volas diskonigi informojn, por domaĝi siajn interesojn».

**Nesolvita triobla murdo**

Post la murdo en 2013, la francaj enketistoj emfazis tiam la «kompromitiĝon» de membroj de la turkaj spionservoj, la MIT, en tiu triobla murdo sen indiki la iniciatintojn.

Turkaj amasinformiloj diskonigis dokumenton de la MIT prezentatan kiel «misiordonon» adresitan al la turka Omer GÜNEY, sola suspektito en la enketo. Li mortis fine de 2016 en malliberejo antaŭ lia antaŭvidita apero ĉe tribunalo. La MIT oficiale dementis ĉian kompromitiĝon en januaro 2014.

Agit POLAT, reprezentanto de la "Demokratia Kurda Konsilio en Francujo", kiu organizis la manifestacion kondamnis interalie la fakton, ke neniu el la familioj de la viktimoj «estis akceptitaj de la francaj aŭtoritatoj dum tiuj kvin lastaj jaroj».

Neniam Milito Inter Ni

# La nova ondo en Silicia Valo – vendado de nefiltrita akvo

Usonaj firmaoj enspezas je vendado de tio, kion ili mem nomas “kruda akvo”, tio estas, akvo sen modifo, sen filtrado, sen ĥemiaĵo kiel fluoro, kiu troviĝas ĉe la akvoj liveritaj de publikaj servoj.



Tiu nova ondo fortiĝis aparte en Silicia Valo, kiu estas regiono konata por naski ekfirmaojn pri teĥnikoscienco, kaj esti loĝata de homoj tiaj “pli naturemaj”.

Laŭ la novaĵretejo *Business Insider*, inter tiuj kredantoj je tiu ondo estas la firmao *Live Water*, kies galjono da akvo estis vendata kontraŭ 38 usonaj dolaroj pasintsemajne. La prezo multe plialtiĝis post la gazeto *New York Times* raportis pri tiu tendenco.

Intervjue al tiu gazeto, la fondinto de *Live Water*, Mukhande Singh, defendis sian produkton kaj pridubis la kvaliton de la akvo el krano: “Ĉu kranakvo? Vi ĉiuj estas trinkantaj akvon infektitan de drogoj por naskiĝkontrolo”, li diris.

Nur tempo montros, ĉu tiu tendenco kontraŭ “malpura akvo” firmiĝos. Ankaŭ demando estas, ĉu tio plibonigos la sanon, ĉu tio iĝos retropaŝo je la konkeroj atingitaj ĝis nun koncerne al prizorgado de trinkakvo.

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog

---

# Ekos en Ameriko la PEN-kampanjo por Nobel-premio

"Kion signifas kandidati por la literatura Nobel-premio?" demandis la ĉefredaktoro de "Literatura Foiro", Zlatoje Martinov, en intervjuo aperonta en LF 291 (februaro 2018). "Prioritate disvastigi la esperantan literaturon" respondis Giorgio Silfer, kiun la LF-abonantaro ĵus indikis per referendumo kiel nian plej popularan verkiston, kune kun Spomenka Ŝtimec, se temas pri verkistino.




Tiucele ne sufiĉas sendi meritliston al la Sveda Akademio: la kandidatoj de nia literaturo ne sidu sur fotelo, atendante la neniamon. Necesas aktivi por diskonigi nian literaturon ekster Esperantio mem.

Kampanjo ekas sur du frontoj: tradukado al gravaj etnolingvoj kaj prelegoj al intelekta publiko. Prof. Silfer prelegvojaĝos tra Meksiko dum la tuta februaro 2018, helpe de la enlanda PEN: li renkontos interalie la prezidantinon de PEN Internacia. Lin akompanos lia edzino, d-ino Perla Martinelli, kiu aktivas ĉe la verkistina komitato de PEN Internacia, kaj en Meksiko renkontos ĝian kunordigantinon. La prelegoj kaj renkontoj okazos en la hispana lingvo.

Ene de la plej grava verkista monda asocio, Giorgio Silfer estas jam la plej konata esperantlingva verkisto: liaj tekstoj aperas en multaj antologioj, zorge de lokaj PEN-Centroj; laste en internacia mikronovelaro eldonita en Argentino.

HeKo 669 9-B, 7 jan 18

# Ligna filtro igas salakvon trinkebla

Usonaj esploristoj de la universitato de Marilando disvolvis novan kaj favorkostan procedon por la sensaligo de marakvo. La du ĉefaj elementoj estas sunlumo kaj tranĉaĵo de ligno.



Por filtrado de akvo necesas precipe specoj de ligno kun la ĝusta grandeco de la poroj. Se la ligna teksaĵo estas tro densa, tiam malpli da akvo povas trairi kaj la procezo daŭras pli longe; se estas tro da poroj aŭ se ili estas tro grandaj, la filtro tralasas tro da akvo. La idealan mezan mezuron laŭ la esploristoj ŝajnas havi interalie lignoj de pinio kaj de poplo.

Konkrete la esploristoj metis tranĉaĵon de ligno kun dikeco de apenaŭ unu centimetro sur la surfacon de akvo kaj varmegigis ĝin per sunlumo. Simile kiel arbo en la naturo transportas akvon de la radikoj al la folioj, ankaŭ tie migras la akvo tra la kanaloj kaj fine vaporiĝas pro la varmegiĝinta ligno. Damaĝaj substancoj kaj salo postrestas.

Por ke tiu procedo funkciu pli bone, la esploristoj karbonigis la surfacon de la ligno - do ili bruligis ĝin ĝis profundeco de malmultaj milimetroj. La malhela areo celite absorbas la sunluman varmegon kaj tiel pli facile konvertas la akvon tie al vaporo. Tio ebligis signife maksimumigi la generadon de vaporo.

Fine la filtrita akvovaporo estas kolektata kaj malvarmigata al trinkebla akvo. Lignoj de pinio, poplo kaj aliaj estas ne nur favorkostaj kaj efikaj - alie ol aliaj filtroj ili ne plenŝtopas la lignokanalojn per deponitaj saloj.

Eĉ pli bone la vertikala strukturo de la lignoporoj prizorgas ke la salo plejgrandparte malsupre falas el la poroj. Certe ligno ne estas la sola materialo kiu taŭgas por filtro. Sed ĝi estas favorkosta kaj elstaras pro siaj vertikalaj kanaloj tra kiuj la akvo estas suĉata kaj ligno krome nur tre malbone tralasas varmon - pro tio la akvo vaporiĝas celite sur la surfaco.

Nun la esploristoj laboras pri metodo por komplete eviti deponaĵojn de salo. La filtro ja iutage daŭre provizu dommastrumejojn per pura dolĉa akvo. La sciencistoj esploras diversajn eblecojn kaj interalie provas optimumigi la strukturon de la ligno.

La planoj por ampleksa apliko de la sistemo por la provizado de akvo ankoraŭ ne estas ellaboritaj. La sciencistoj devas elkalkuli la kostojn kaj kiel ofte la filtroj estos ŝanĝendaj. Krome ili volas testi plue ĉu la natura filtro povas ankaŭ forigi pesticidojn, pezajn metalojn kaj aliajn ĥemiaĵojn el la akvo.

Esperanta Retradio

# La Kruela Postlasaĵo de Kristoforo KOLOMBO

En 1992 ni solenos [fakte solenis] la kvincentjaran jubileon pri la "eltrovo" de Ameriko. La Usona Kongreso monprovizis jubilean komisionon por instigi verkaĵojn kaj publikajn paroladojn por soleni la datrevenon.



Kiel sentas sin pri ĉi tiu afero la indiĝenaj Amerikanoj - posteuloj de la tiel nomataj indianoj, vivintaj kaj prosperintaj tra la okcidenta hemisfero, kiujn KOLOMBO kaj aliaj Eŭropanoj konkeruloj eltrovis tie?

Imagu kiel judoj, ciganoj, kaj slavoj sentus sin se iu solena festo estus organizita por noti la kvindekan datrevenon de la "eltrovo" far HITLERO de orienta Eŭropo en 1939.

Kio estis gajiga malkovro kaj kuraĝa altrudo por famo, rango, kaj riĉaĵoj de la maristaj Eŭropanoj, por la indianoj estis senbrida atenco kontraŭ la propraj popoloj kaj kulturoj, kiuj, plejparte, finiĝis en skavigado kaj genocido.

La unua hispana kolonieto fondita dum la vojaĝjaro 1492 de KOLOMBO troviĝis sur la insulo de Hispaniolo (nuntempe dividita inter la Dominikana Respubliko kaj Haitio). La indiĝena Aravaka popolo, kiu nombris je pli ol 300 000, vivtenis sin bone per kulturado de kasavo, terpomoj, arakidoj, kaj kapsikoj, kaj per retkaptado de fiŝoj kiuj abundis en marbordaj akvoj. Tamen la insulo estis malbenita de naturo per riĉaj orprovizoj malkovritaj de la hispanoj en 1500.

**La Malbeno de Oro**

Simple, por la indianoj oro estis ĉarmaj ornamaĵoj, sed por la hispanaj aventuristoj, ĝi estus tutviva obsedo. Ili friponegis, rabis, kaj atakis la indianojn por kapti artaĵojn kaj religiajn objektojn, kiuj estis mulditaj kaj martelitaj el oro kaj arĝento de la indianaj artistoj. Kiam la indianaj provizoj de gemoj kaj valoraj metalaĵoj estis elĉerpitaj, la hispanoj perforte pelis ilin en minejojn kaj perlajn fiŝkaptejojn. La indianaj viroj estis devigitaj fosi oron kaj plonĝi por perloj por la novvenantoj kaj ilia malproksima reĝo. Por ellaciga laboro sub malsanigaj kondiĉoj, ili ricevis salajrojn kiuj estis nura porcieto por la hispano, kaj tute senutila al la indiano.

"Estis multaj okazoj", skribis Bartolome de LAS CASAS, "kiam hispano vipus siajn indianajn fosistojn se ili ne ŝvitis, dirante, 'Kial vi ne ŝvitas, hundoj?' kaj la hispana edzino agis sammaniere kontraŭ la indianinoj, kradinte kasavon, kaj per samaj vortoj...".

**Bartolome de LAS CASAS**


LAS CASAS, kies patro partoprenis en la dua vojaĝo de KOLOMBO, kaj gajnis riĉaĵojn per ekspluato de la indiana laboro en Hispaniolo, fariĝis la unua katolika pastro ordinita en Ameriko en 1512. Ankoraŭ LAS CASAS mem daŭrigis la posedadon de indianaj skavoj sur sia riĉega bieno en Kubo. Kvankam li traktis siajn indianajn laboristojn pli bone meze ol la hispana koloniisto, lia konscienco ŝiriĝis pro la suferado kaj humiligo altrudita al la indiĝena popolo.

Iom da hispanaj dominikaj pastroj pasie kondamnis la sklavposedadon de siaj propraj naciuloj sur Hispaniolo. Ĉi tiu influis la agon de LAS CASAS, kaj li decidis liberigi siajn proprajn sklavojn en 1514. De tiu tempo ĝis la morto pli ol

50 jarojn poste, Las Casas fariĝis la plej energia kaj persistema pledanto por la indianaj rajtoj en la Hispana, kaj efektive, en la Eŭropa mondo.

**Du Respondoj al Genocido**

Per siaj vervaj predikoj defende de la indianoj, kaj per sia rifuzo doni la finajn sakramentojn al mortintaj koloniistoj se ili ne liberigis siajn indianajn sklavojn, LAS CASAS ankoraŭ ne sukcesis konvinki siajn samlandanojn ŝanĝi siajn kutimojn. Ĉirkaŭ 1520, la indiĝena popolo de Kubo malgrandiĝis proksimume 90% pro trolaborado, malsatigo, malsano, alsalto, kaj mortigo.



La Arakva ĉefo HATUEJ, kiu gvidis sian popolon en ilia kontraŭstaro al la hispanoj, malestimege malkovris korbon plenitan per oro kaj diris, "Jen ilia Sinjoro, kiun ili servas kaj adoras... Por li ili persekutas nin, por li ili mortigis niajn gepatrojn, tutan nian popolon kaj ĉiujn niajn najbarojn".

Sur sia humila mortlito en Hispanujo en 1506, KOLOMBO lamentis ke ses el sep indianoj de Hispaniolo mortis de mistraktado post kiam li forlasis la insulon. Tamen KOLOMBO, kiu fondis la sistemon mem kiu pelis la Karibeanojn al estingo, ne vidis la detruadon de indianaj vivoj kaj kulturoj kiel krimon kontraŭ homaro. Pli ĝuste, li ploregis pri la perdo de mono al Hispanujo kaj ĝia krono kaŭzite de la koloniistoj per superfervora detruado de propra fonto de sklavlaboro.

LAS CASAS prenis radike alian vidpunkton. Enkondukinte sian argumentaron al la plej altaj niveloj de la eklezio kaj ŝtato en Romo kaj Hispanujo, li insistis ke la hispana reĝo kaj la katolika papo metu finon al la sklavigo de indianoj. Malestimeginte la financajn interesojn de Hispanujo, LAS CASAS emfazis la homajn rajtojn de la indianoj. "La kaŭzo kial la krsitanoj mortigis kaj detruis tiujn senlimajn nombrojn de personoj", li skribis en eldonaĵo de 1552, "estas ke ili motiviĝis per sia deziro por oro kaj sia deziro riĉiĝi sin dum tre mallonga tempo".


LAS CASAS konstatis ke la indianoj havis ĉiun rajton rifuzi la kristanan dion kiu estis trudata al ili per glavpinto. Antaŭ lia bruligo ĉe la fosto por la krimo de ribelado kontraŭ la hispanaj konkeruloj, al unu Arakva indiano de Hispaniolo estis ofertita bapto de pastro, kiu tiel promesis al li enirigon en la Ĉielon. La indiano rifuzis, timante, ke en la Ĉielo, li povus trovi kristanojn kiel ĉi tiujn.

**Ĉu Pravigi la Konkeron aŭ Defendi la Indianojn?**

La starigitaj fortoj en la Hispana kortego kaj katolika hierarkio, kiuj profitis per la indiana sklava laboro, kontraŭstaris la kampanjon de LAS CASAS. Li devis partopreni en longaj teologiaj kaj filozofiaj debatoj kontraŭ tiuj kiuj opiniis ke la indianoj posedis nek racion nek animon, kaj tial ili estis prave konkeritaj kaj sklavigitaj. La aristotela klerulo Juan Gines de SEPULVEDA, kiu neniam vizitis Amerikon, argumentis ke la indianoj "estas malsuperaj al la hispanoj same kiel infanoj estas al plenkreskuloj, virinoj al viroj, kaj ja... kiel simioj estas al homoj".

LAS CASAS petegis al la Papo PAŬLO III por subteni sin en la debato. En 1537 la Papo eldonis papan buleon deklarinte ke indianoj ja havas racion kaj animon, tial ili estas egalaj al aliaj homoj kaj ili ne devas esti senigitaj je siaj

libereco aŭ posedaĵoj, kaj ili estas pretaj ricevi la katolikan kredon kaj informon. La papa buleo estis, efektive, dutranĉa: ĝi helpis LAS CASAS-n kaj aliajn humanajn pastrojn en iliaj luktoj liberigi la indianojn el skalveco kaj milita atenco; samtempe, ĝi ebenigis la vojon por vastega kampanjo evangeliumi inter la Amerikanaj indianoj, subteninte la nepran superecon de katolika kredo super la propraj kredaj sistemoj kaj dioj de la indiĝenaj popoloj.



Ree al Hispanujo, LAS CASAS agitis la Hispanan kortegon eldoni la Novajn Leĝojn de la Indioj en 1542. Ĉi tiuj leĝoj ne sufiĉe subtenis lian postulon por la senpera liberigo de ĉiuj indianoj tenataj en sklaveco. Tamen ili fortigis leĝajn protektojn por indianoj en la Hispana imperio, kaj deklaris ke indianaj sklavoj estus liberigitaj je la morto de siaj posedantoj. Tiel teorie, indiana sklaveco estus finita por unu aŭ du hispanaj generacioj.

**Klera Teorio Kontraŭ Sklaviga Kutimo**

Praktike, ĉio elfariĝis malsame. Kiam LAS CASAS, kiu tiam havis sepdek jarojn, revenis al Ameriko efikigi la novajn leĝojn, li renkontis fortegan opozicion fare de la hispanaj koloniistoj, inkluzive armitan ribelon kontraŭ reĝo de Hispanujo per la konkeruloj en Peruo. La reĝo retiriĝis, restariginte al la sklavposedantoj iliajn rajtojn doni siajn bienojn (kaj sklavojn) al siaj heredantoj. LAS CASAS revenis al Hispanujo, kie li daŭre argumentis kaj skribis por indianaj homaj rajtoj ĝis sia morto.

Ĉio kion LAS CASAS kapablis atingi en sia vivo estis serio da leĝaj reformoj kiuj parte faciligis la stataĉon de indiĝenaj Amerikanoj, sklavigitaj kaj subpremitaj interne de la Hispana imperio. Tamen la leĝaj rajtoj de la indianoj, kiuj ĝenerale havis nenian rajton de aliro al Hispanaj leĝlibroj aŭ advokatoj, ofte estis piedpremataj de grandegaj bienuloj kaj senskrupulaj oficistoj de la eklezio kaj ŝtato.

**Kial estas Kolombo "Amerika Heroo"?**

Estas interese mediti kial la anglosaksaj estroj de Usono, kiuj neniam estis fervoruloj pri la historio de la Hispana imperio, insistas pri la subteno kaj celebrado de la "eltrovo" de Ameriko far KOLOMBO por la Hispana krono. Post ĉio, Anglujo kaj Hispanujo batalis unu la alian por supereco de la Ameriko en la Karibeo, Florido, kaj en Eŭropo mem.

Kiam okazas la glorado de Eŭropa konkero de indianaj popoloj kaj rabaĵo de indianaj bienoj, malnovaj malamikoj kuntiriĝas. Estas notinde rememori ke Georgo VAŜINGTONO, posedanto de Afrikaj sklavoj, ordonis siajn armeojn bruligi kaj ebenigi tiom da urbetoj de Irokvojaj indianoj dum la revolucia milito, ke la Irokezoj [Haudenosaunee-oj "popolo konstruanta longan domon".] moknomis VAŜINGTONON "La Detruisto de Urboj".

Daniel FOGEL
Tradukis Minerva MASSEN
Ateismo, Organo de ATEO, 1989 V. 1, nº 3